Dumonata kultura informilo k esprimilo esperantista. 3 FF
Nº 32 (50) - Januaro/Februaro 1981

ISSN 0150-5823




Eldonas : Cercle espérantiste de l'Agenais, F 47340 LAROQUE
Poŝtkonto : 3 371 74 M Bordeaux

Abono por unu jaro : 18 FF (14 FF por Francio) al la ĉi-apuda pĉk.

**la kastelnova grupo** — INAŬGURO —



Antoni Madej : E S P E R A N T O - G R A M O J

La sama temo

De l'edzino vesto
La edza investo !

Birdeskulino

Estas ŝi kiel garolo
Tre ŝatas aĵojn el oro.

Pri reĝoj

Estis reĝoj
La Forta, la Brava,
Sed ĉu estis unu
la prava ?

Abundana penso

Certe reala estas tio
Ke, la mondo fariĝos satio!

Pri devo

Kiam ŝi ĉesis rezisti
Li jam ne volis insisti.
Tiel nin realo vekas
Se ni kontraŭ devo pekas.

x x x

Estas ekspertoj
pri la ek-spertoj.

Problemo

Ege grava problemo
Estas ŝia sen temo.

Pri pacienco

Ĉiam de komenco
Ni aŭdas paciencon, paciencon!

x x x

Estas Tiuj
Al Kiuj
La pacienco
rabis potencon.

Respektema p....

Agis ŝi diable
Sed, kiom agrable !

Hamletaĵo

Diversaj estas manioj
unu volas kranion,
alia Ofelion !

Pri sklerotikulo

Ami certe neniam li ĉesus,
Se la agadon li ne forgesus!

Prefero

Prefere kun diablo
Sed, ĝis agrablo.

Malkaŝita kokro

Malpaco
pro kaco.

Internacia Amikeco

Diversaj estas inklinoj
unu volas "Pola Esperantisto"n
alia polan esperantistinon.

Protesto

Kontraŭ ĉi tiaj demandoj
mi protestas :
Ĉu bestoj pli homas,
Ĉu homoj pli bestas ?!

Kio forlogas ilin ?

Plendis foje unu samideano
ke, post kongreso doloras
lin manoj.

Lerni novan fakon

Samideanoj, provu iom
La esperantistan metion !



# NIA DEBATO

## * Ĉu bankrotis la racio ?

"Unuvorte, SAT celas per konstanta uzado de racie elpensita lingvo kaj ĝia mondskala aplikado, helpadi al la kreado de racie pensantaj spiritoj, kapablaj bone kompari, ĝuste kompreni kaj prijuĝi ideojn, tezojn, tendencojn kaj sekve kapablaj elekti memstare la vojon, kiun ili opinias plej rekta, aŭ plej irebla por la liberigo de sia klaso kaj forkonduko de la homaro al kiel eble plej alta ŝtupo de civilizacio kaj kulturo."
(ekstrakto el la statuto de SAT)

Tiel do ni estis trafontaj plej altan nivelon de civilizacio el primitivo al socialismo, aŭ, se oni preferas, el malpura, animala (besta!) stato al plej pura, spirita (dia?) bonfarto... Sed, ŝajne, tiu erektpenisa sociaro malkacumis. Nia soifo al absoluteco kaj eterneco nur restas ŝvebanta kvazaŭ neelĉerpebla mito de perdita (-ata) paradizo, dum la racie elpensitaj sistemoj de l'homaro fariĝis plej taŭgaj iloj por ĝia ĉiutaga konstanta freneziĝo.

Jam de longe agordiĝis la voĉoj de eklezioj ĉiaspecaj (kristanaj, marksistaj...) por kantadi la oferon de iel fiaj deziroj cele al la rekta vojo kaj ĝia paradiza finstacio.

Novajn pastrojn naskis raciismo kaj ateismo... Mizeregon naskis ekonomia riĉo... Novajn sklavojn la respublikoj, novajn ekspluatatojn la demokratioj... Polucion naskis la scienca mastrumado de l'medio... Atomenergio aperas kvazaŭ klimakso de masklismo fuŝiteco. Ni fieregas pro nia inteligento sed ne kapablas mem koni nin kaj ekvilibre vivi.
Ĉu ne pli de l'sezonciklo ol de konkero de la luno dependas ni ?

Ĉu ne ekzistas alie pli taŭgaj manieroj senti la vivon ol konkeri, klasifiki, unuformigi, fiksigi kaj fine subpremi ?

Ĉu racie estas estonta feliĉo kontraŭ momenta plezuro, grando kontraŭ malgrando, forto kontraŭ malforto, masklo kontraŭ ino, unuo kontraŭ pluro, familiaro kontraŭ fremdo, blanko kontraŭ nigro...?

Kaj finfine, rilate al Esperanto, ĉu ni povu paroli pri "racia lingvo" ? Ĉu racie ne estas limige ? ĉu lingvo ne preterfluas racion ? ĉu ne pro tio sukcesis Esperanto, ke ĝi ne tuta raciaĵo estis kaj ĉu ni ne riskas kondamni ĝin al mortigo, se daŭre ni havos pretendon fari el ĝi universalaĵon ?

Patriko.

Almenaŭ de la deknaŭa jarcento la kutime nomataj progresuloj estis persvaditaj, ke la racio, forpelante la superstiĉojn, la malklarecon, kondukos la homaron al libero kaj bonstato, tra la senfina progreso de la sciencoj kaj teknikoj. "Kiam oni malfermas lernejon, oni fermas karceron". "La disvolvo de la produktrimedoj nepre kondukos al socialismo !"

Tia estis la spiritostato de la edukistoj, sindikataj aŭ politikaj aktivuloj el la progresemaj medioj (inkluzive SAT). Oni parolis pri "racia lernejo", "scienca organizado de la socio".

La tekniko estis kvazaŭ nova dio ! Oni konsideris nur la intelektan parton de la homo : la racia penso devas aŭ devos ĉion klarigi.

Nur kelkaj malharmoniaj voĉoj provis aŭdigi aliajn vidpunktojn : la psikanalizistoj, parolante pri la grava rolo de la instinktoj kaj pli ĝenerale de la nekonsciaj sintenoj ; ĉe la individuoj, ankaŭ la superrealistoj, kiuj skribis : "Ni suferas pri putro, la putro de la racio" (Superrealisma revolucio n-ro 3).

Sed la klasikaj scienculoj aŭ artistoj ne taksis seriozaj tiujn ŝerculojn. Tamen la Moskvaj Procesoj kun la memkritikoj de la akuzatoj kaj la sukceso de la delira doktrino de la nazioj en Germanio estus povintaj konduki la dubemon en la cerbojn de niaj raciaj humanistoj : la homoj ofte obeas nebremseblajn motivojn, sed la maŝino daŭrigas sian rondiradon !

De post la dua mondmilito oni ĉeestas la veran fiaskon de la laŭdire racia civilizacio : en kvardek jaroj oni



detruis miljaran naturan ekvilibron. Ĉiam kondutas la ŝtatestroj kiel frenezuloj. En la tuta mondo oni torturas, oni "engulagigas", mortpafas nome de la socialismo, de Alaho, de la okcidentaj valoroj ktp...

Ĉiam la malplimultoj estas neataj, eĉ amase buĉataj, kiam ili ribelas.

La mondo de elektroniko kun ties planoj, sliparoj, ĉirkaŭbaras la individuon.

La nuklea socio minacas la pluvivon mem de la homaro. Kaj la homaro, tute anestezita per la modernaj informrimedoj, ne plu reagas, aŭ reagas nur por subteni aliajn subpremantojn (Vd. Iranon, Vjetnamion ktp)...

La alvokoj al la racio ne sukcesas, ĉar la homoj ne estas "raciaj bestoj". Ili ofte uzas siajn mensajn kapablojn por la plej stultaj aferoj : inventi senutilajn bagatelaĵojn aŭ eĉ detruilojn.

La espero (eta) estas la kelkaj malobeantoj, kiuj en la mondo diras ne al tiu stulta socio, kiun la usona verkisto Henry Miller nomis "la klimatizata inkubsonĝo".

J.G.

Racio, al kiu la SAT-statuto devigas sian anaron, estas, laŭ PIV : "Tiu parto de la mensa strukturo, kiu servas al la homo por malkovri kaj formuli leĝojn de la universo kaj laŭ ili fabriki ilojn aŭ maŝinojn".

Konsiderante tiun ĉi difinon, oni povas diri, ke racio triumfas, ĉar iloj kaj maŝinoj senĉese perfektiĝas. Dum la lastaj pasintaj jarcentoj kaj ĉefe dum la 19a kaj la komenco de nia jarcento oni kredis, ke la uzado de la racio kondukos devige al pli bona socio. La kapitalisman fisocion postsekvos socialisma aŭ komunisma socio. Ne gravas la nomo, fakte socio, kie la homaro estos feliĉa. Fakte la tekniko tutcerte estigis multe pli da bono ol ĝiaj kontraŭuloj konfesas. Ĝi malgrandigis la mondon kaj fakte alproksimigis la homojn. Medicino estas unu el la ĉefaj gajnoj de la nuntempo.

Tamen oni devas konstati, ke plu ekzistas militoj, ke la homo detruas sian ĉirkaŭmedion. Evidentiĝas, ke nia nuna socio ne estas pli bona ol la antaŭaj. Tekniko ebligas nekompareble pli komfortan vivon, kiu plaĉas (volenevole) al ĉiuj, tamen ĝi samtempe donas al la homaro

la eblecon sin neniigi grandskale. Medicino ebligas pli longan vivon, malaltigas infanan mortemon kaj samtempe levas en multaj landoj nesolveblajn problemojn, ĉar homoj, kiuj antaŭe mortis pro nekuracita malsano, nun plu vivas sen ebleco sin konvene nutri (Hindio, Ĉinio ktp). Sekve, ŝajnas al mi, ke la nura racio ne povas klarigi la homan sintenon. Emoj gravas en nia sinteno almenaŭ tiel multe kiel racio. Ĉu cetere oni ne konstruis (eĉ eble plu konstruas) koncentrejojn je la nomo de racio ?

La senproblema marŝo al pli bona mondo, kiun antaŭvidis la ĝisnunaj raciemuloj aspektas pli kaj pli kiel mito.

Robert Pontnau.

-------

Post tiuj unuaj kontribuoj, la prudento de la redaktanto trudas al li konsili paŭzon al ĉiu legant(in)o. Ĉiu eliru kelkajn minutojn, iom gimnastu, spiregu kaj - kun nova oksigenprovizo - retrovu sian "Laŭte!" por la senkompata daŭrigo jena. Ek!

-------

## ĈU BANKROTAS RACIO AŬ RACIISMO ?

Mi tre ĝojas pri tiu debato, ĉar mi mem provis enkonduki debaton pri racio en LJP antaŭ pluraj jaroj, sed mia enkonduko perdiĝis. Intertempe, multe evoluis mia penso, kaj nun mi zorge distingas racion kaj raciismon.

Raciismo estas la religio, laŭ kiu homo devas dediĉi siajn fortojn, fizikajn kaj mensajn, al unu afero : la Racio, kaj por tiu celo rezigni pri ĉio, kio ne estas racia. Ambaŭ difinoj de la vorto "racio" en PIV kaj PV estas verkitaj de adeptoj de tiu religio, sed en Plena Vortaro la dogmo estas ankoraŭ pli klare esprimita : Racio estas la karakterizo de la homa menso. Do, tion bone sciu, kamaradoj : la karakterizo de homo ne estas, ekzemple, arto, evidente ne estas religio. Ne, homo fariĝas homo per ununura afero : Racio. Sekve, detruenda estas ĉio, kio ne subiĝas al tiu ununura principo. Tio estas ekzakte la difino de dio.



La raciisma religio aperis en la 18a jarcento, t.e. samtempe kiam triumfis la burĝaro, kaj samtempe kiam organiziĝis la imperiismoj kaj la divido de kolonioj inter la diversaj ŝtatoj de la blankhaŭtuloj. Same kiel multaj novaj religioj (ĉu ĉiuj ?), ĝi aperis kiel reago al la religioj, kiuj ekzistis antaŭe, ĉefe katolikismo. Katolikismo estis kreita per la ŝtatigo de la kristanaro fare de la roma imperio, sekve, ĝi poste utilis kiel pravigo de la sankta imperio, fondita de Karlo la Granda en 800 per sia kronado fare de la papo, kaj kiu origine estis la politika organizacio de la okcidentaj kristanoj. Tiu imperio iom post iom degeneris, ĝi estis konceptita en la 15a jarcento kiel la politika organizo nur de la germana nacio. Ĝi malaperis en 1806 pro la napoleonaj invadoj. Ĝi estis la unua germana imperio, la nura el la tri germanaj imperioj, kiu efektive estis miljara (informo de germanistino al francoj, kiuj kutime tre malbone interpretas la eŭropan historion pro la forta franca naciismo de la laikaj lernejoj). Raciismo estas la religio de la socio, kiu sekvis, en la evoluo de okcidenta Eŭropo, feŭdismon, nome, kapitalismo.

Kiuj estas la dogmoj de la raciisma religio ?
- utilismo. Kiel diras PIV, racio estas tio en la menso de homo, kiu ebligas al li krei ilojn. Aliaj karakterizoj de la homa menso ebligas al homoj krei ankaŭ multajn aferojn, ekzemple kantojn. Sed, se oni kredas, ke racio estas karakterizo de homeco, universala trajto, per kiu oni distingas homon de nehomo, do homo estas sur la tero por fari ilojn. Ilojn por kion fari ? La demando ne estas kutime metata. Estas do logike, ke tiu religio ideologie pravigas maŝinismon. Ĝi estas la religio de la industria revolucio : ni ĉiam konstruu pli da iloj, pli da maŝinoj, la fervojon, la aviadilojn (kiel konsilas al ni Archdeacon), la atomcentralojn ktp. Tio estas progreso. Se vi volas kontraŭstari en via anguleto de la terglobo konstruon de nova ilo, kiel aŭtoŝoseo, retenilo de akvo ktp, vi estas kontraŭ la progreso. Vi estas homo, kiu pensas, kiel en la mezepoko, t.e. kiel pensis homoj en la tempo antaŭ apero de kapitalismo (laŭ la raciisma religio). Kompreneble, ĉar tiu religio estas la ĝusta, ĝi estas la lasta, ĝin neniam sekvos alia religio, do via rifuzo, ke homoj konstruu ilon en via regiono, pruvas, ke vi estas pasintemulo,

kaj kontraŭprogresisto.
- sciencismo. Same kiel la papo, la verkinto de PV kredas, ke la mondo havas eternajn leĝojn. Dum la papo kredas, ke la universalaj leĝoj estas en la Biblio kaj karitate helpas al vi ilin trovi en la libro, se ilin vi tute ne vidis en ĝi, raciistoj kredas, ke la universalajn leĝojn de la universo, kies kono estas la karakterizo de la homeco, revelacias la sciencistoj. Do sciencistoj karitate helpos al vi fariĝi homo. Tio estas evidenta eraro laŭ scienca vidpunkto. Sciencistoj ne konas la leĝojn de la universo (supoze, ke ĝi havas), sed esprimas hipotezojn pri la universo. Tiom longe, kiom la hipotezoj efektive ebligas fabriki ilojn, la hipotezojn oni konservas. Kiam tio ne plu funkcias, oni faras eksperimentojn, ĝis novaj malkovroj ebligos konstrui novajn hipotezojn, kiuj siaflanke povos esti detruataj, se ili ne plu funkcias. Konsekvence, se vi argumentas "estas science pruvite, ke", via argumento ne estas scienca, sed religia : vi fidas al tiuj, kiuj revelacias al vi la veron pri la universo, dum ili mem modeste diras, ke ili havas hipotezojn. Sed hipotezo ne povas kontentigi la scimalsaton de homoj, tial scienco fariĝis dio, kies dekretoj estas revelacieblaj.

Tiu religio fariĝis ŝtatreligio dum la Franca Revolucio. Ĉar de unu paĝo mi vidas trans Vogezoj religianojn, kiuj pretas min akuzi pri herezeco, ĉar mi diras, ke raciismo estas religio, nu jen historiaj faktoj :

- Robespierre prezidis ceremonion, dum kiu oni simbole bruligis idolon reprezentantan ateismon. La franca respubliko metis siajn leĝojn sub la protekton de la "Supera Estanto", kiu estas malbone difinita, sed similas la dion, por kiu Voltaire tiom akre rebatis kontraŭ ateistoj, kiujn li eĉ nomis frenezuloj.
- dum la sama tempo, estis organizita en la katedralo de Parizo, iam dediĉita de la katolikoj al la Sankta Virgulino, religiajn ceremoniojn por kulti al la Racio (ankaŭ al la Patrujo, kompreneble. La dio de la franca revolucio estis la Supera Estanto, kaj ĝi havis multajn duondiojn, inter ili la Nacio, la Racio ktp, iliajn nomojn oni povas legi sur la respublika kalendaro). Ne eblas kontesti la evidente religian karakteron de la kulto al racio dum la franca revolucio.



- la franca revolucio anstataŭis la katolikan bapton per la "civitana bapto". Kiam oni konas la efektivan ideologion de la epoko, absolute ne eblas kredi, ke la civitana bapto estas esprimo de ateistaj kredoj de la gepatroj. Evidente, en respubliko, kie la leĝoj estis farataj sub la rigardo de iu Supera Estanto, la civitana bapto estas aliĝo al la ŝtatreligio. La formulo de la ĵuro de la gepatroj kaj baptogepatroj, ke ili edukos la infanon en la kulto al Racio kaj Vero,ebligas konkludi ke, inter la diversaj duondioj de la respubliko, Racio estis la plej grava. (Tial oni kultis al ĝi en la katedralo). Tio povas aperi kiel superstiĉo de jam forpasinta epoko. Tute ne! Antaŭ tre mallonga tempo, en Elzaco kaj Vogezio, gepatroj, kiuj kredis sin mem liberpensaj, trudis al urbestroj, kiuj hezitis pro siaj propraj kristanaj konvinkoj, ke, kiel reprezentantoj de la franca ŝtato, ili baptu la infanojn en urbodomoj post la respublikana ĵuro de gepatroj kaj baptogepatroj, ke la infanojn ili edukos en la kulto de Racio. Do ŝajne, ankoraŭ nun, la religio, kiun ĝiaj adeptoj nomas liberpenso, postulas, ke, trudante al la konscienco de alikredantoj, oni nepre havigu al infanetoj la baptan sakramenton en la religio de la ŝtato.

Sed raciistoj de la fino de la 18a jarcento preteratentis la averton de sia profeto Voltaire. Voltaire konsciis, ke lia religio estas rezervota al elito, nome, la filozofoj. La popolo devas plu kredi al la kutima religio (katolikismo), ĝi estas ja idiota, sed oni klerigu nur la intelektulojn, ĉar, se la tajloro de Voltaire ne estus katoliko, lia konscienco permesus al li ŝteli ankoraŭ pli pri la prezo de la vestoj, kaj la monujo de la filozofo, kvankam kredeble pli plena, ol tiu de la laboristoj, tamen estas elĉerpebla. Ŝajne la aventuro kun Frederiko de Prusujo montris al Voltaire, ke la ideo, ke filozofoj estu la reĝoj, kaj regu siajn regnanojn per lutheranismo, ne estas tiom prava, kiom li kredis, kiam li ekservis la prusan monarkion. Sed nepre ne la penso de filozofoj fariĝu popola, aŭ per kio mi pagos miajn vestojn ? Kiel antaŭvidis Voltaire, lia religio de la Supera Estanto, kiam oni volis trudi ĝin al tuta popolo, fiaskis. Tial Napoleono restarigis katolikismon, kaj la tajloro de Voltaire plu povis preĝi al la Sankta Virgulino en Parizo. Do, per racia penso, Napoleono decidis interkonsenti

kun la papo (tiu interkonsento plu havas leĝan valoron, en 1980, en Elzaco kaj Mozelio), kaj samtempe inventis la napoleonan leĝaron, kiu, en 1980, plu estas la bazo de la franca leĝaro. Tamen, kelkaj burĝoj kredis sin sufiĉe kleraj por ne konvertiĝi al katolikismo, kaj, ne sciante kion fari per la religio de la Supera Estanto, kiu tiom okulfrape fiaskis, konvertis sin al ateismo. Al ateismo ili postmorte konvertis ankaŭ Voltaire, kiu, kompatindulo, devis turni sin en la tombo. Strange, ili ateistigis ankaŭ Kartezio-n. René Descartes estis katolika mistikulo, kutimanta pilgrimi al sankta Anna en Bretonio, sed, kiel matematikisto, li konfliktis en sia profesia medio kun naskiĝanta ateismo. Saman problemon havis matematikisto Blaise Pascal, kaj Pascal solvis ĝin jene : por plukredi, necesas ekkredi, poste la konvinko venas de si mem, kaj oni ne plu sin demandas (ŝajne li estis bona psikologo). Sed kial mi ekkredu, demandas ateisto. Nu, se vi estas 100-procente certa, ke infero ne ekzistas, vi ne estas konvinkebla. Tamen, neniu homo estas 100-procente certa pri siaj konvinkoj, do se nur 99,99-procente vi estas certa, ke infero ne ekzistas, la ĵus de Pascal mem eltrovita teorio pri probabloj racie montras, ke estas via intereso konvertiĝi almenaŭ antaŭ via morto, por eviti la teruregan inferon. Sed ŝajne la kolegoj de Kartezio estis 100-procente certaj, ke infero ne ekzistas. Tio neniel min mirigas, ĉar, en 1980, pli ol duono de katolikoj en Francio kredas je neekzisto de infero, tiel, ke papo devis plu revelacii al siaj ŝafoj, ke infero estas unu el la eternaj leĝoj de la universo. Se vi estas 100-procente certa, ke infero ne ekzistas, vidvas trovi alian motivon por adori Dion. Doni al siaj ateistaj kolegoj tian motivon, tiel estas la celo de la filozofiaj verkoj de Kartezio.

La kulmino de la kartezia penso estas la paragrafo de "Metafizikaj meditoj", kie Kartezio, kredante, ke li ĵus atingis sian celon, t.e. pruvi per raciaj argumentoj al siaj ateistaj kolegoj, ke ekzistas Dio, mistike dankas al Dio, ke li ebligis al li realigi tiun savigan mision. Bone punita li estas pro tiom superstiĉa konduto : nun oni nomas "kartezia" la penson de homo, kiu, sin liberiginte de ĉiaj superstiĉoj, pensas nur racie. Tamen,ne bezonas René Descartes emociiĝi en la paradizo de sankta Anna :



tia homo ne ekzistas. La fakto, ke francaj ateistoj aneksas la profetojn de aliaj kredoj, emigas min kredi, ke ili havas malfacilon por nomi siajn. Tamen, la transiro de raciismo al ateismo, eĉ, se ĝi turnus Voltaire en lia panteona tombo, ebligas klare diri, kio estas la superstiĉoj, kiujn la racia religio devas kontraŭbatali. Kompreneble, en Francio, temas pri katolikismo, kaj tial la broŝuroj de t.n. liberpensuloj malofte parolas pri io alia ol pri tio, kion francaj ateistoj kredas pri katolikismo (plej ofte erare). Tamen la transiro ebligas avantaĝan distingon inter religioj kun Dio, kaj religioj sen Dio. Antaŭ pli ol mil jaroj, sankta Marteno alvenis en vilaĝo Hyds en Burbonio por konverti keltojn al katolikismo. La vidpunkto de sankta Marteno pri klasifiko de la religioj estis simpla : ĉiuj religioj estas paganaj, escepte de judaismo kaj kristanismo. La klara pruvo de tio estas, ke ĉiuj religioj (konataj de li), escepte de tiuj du, adoras plurajn diojn, kaj li nur unu, kio estas evidenta progreso (same kiel, laŭ kelkaj - ne ĉiuj - sennaciistoj, estas avantaĝo, ke ekzistu nur malgranda nombro da ŝtatoj kun malgranda nombro da armeoj, ĉar multegaj ŝtatetoj kun multegaj armeetoj faras multegajn militetojn, anstataŭ nur unu militon por detrui la homan specon). Kiun rezulton li atingis ? Pli ol mil jarojn poste, mia avino estis kelta sorĉistino, sed ŝi tute sincere kredis sin katolikino de la paroko de sankta Marteno en Hyds. La herboj, kaj aliaj teknikoj, per kiuj ŝi kuracis malsanetojn kaj vundetojn verŝajne estis hereditaj de praaj kamparanaj konoj de keltaj paganoj, sed la preĝoj, kiujn ŝi recitis, turnis sin al granda nombro da sanktuloj akceptitaj de la katolika eklezio. Poste kompetentuloj pruvis, ke la sanktuloj preĝataj en Burbonio plej ofte ekzakte respondas al iamaj keltaj fontodioj. Sed mia avino ne estis sufiĉe klera por legi iliajn verkojn, do ŝi plej sincere kredis sin katolika. Same, raciistoj kredas, ke estas grandega progreso, ke oni ne kredu dion. Superstiĉaj estas ĉiuj kredoj, kiuj uzas la vorton Dio (aŭ eventuale dioj). Mi iam diris al adeptino de la raciista religio, ke jes evidente, la inkvizicio brulis alikredantojn (plej ofte tute ne ateistajn), ke tio estas religia fanatikeco, sed, ke mi ĵus legis en la kroniko de Amnestio Internacia, ke en Sovetio oni sendis monaĥ-

inon al koncentrejo, ĉar ŝi brodis sur zonoj frazojn el la psalmaro. Mi demandis ŝin, ĉu tio ne estas same religia persekuto. Tute ne, diris ŝi, ĉar ateismo evidente ne estas religio. Se kristano persekutas ateiston, tio pruvas, ke religio fanatikigas la homojn. Sed se ateisto persekutas monaĥinon, tio evidente estas pro politika motivo. Ŝajne, laŭ ŝia teorio, la inkvizicio ne aperis pro politika motivo. Strange ! Mi konfesas, ke, eventuale pro mia propra fanatikeco (?), mi tute ne vidas la diferencon, kaj ambaŭ kondutojn mi nomas religia fanatikeco kaŭzita de politikaj motivoj. Mi ne malaprobas, ke homo adoras nenion, mi nur konstatas, ke tio ne eblas. Tiujn, kiuj konscias pri sia adoremo, mi opinias pli raciaj ol tiujn, kiuj kredas siajn mensojn liberigitaj de religieco. Pli racia estas katolika amiko mia, kiu konfesas sian kontraŭdiron (laŭ mi tre facile venkeblan), dirante : "Vidu, Jacqueline, ĉe mi Esperanto estas religio pli granda, ol mia kristaneco", ol homo, kiu estante (kredante esti?) ateista, sed efektive adorante Esperanton (subkonscie), neas tiun kontraŭdiron senhezite skribante, ke Esperanto neniam estis ligita al religio. Por leginto de Zamenhof, tiu aserto estas evidenta rifuzo de la historia realo de nia lingvo (efektive Zamenhof ne trudis sian religiecon al aliaj esperantistoj), ke Esp-aperis pro la religieco de la zamenhofa menso estas okulfrapa historia realo, ĉu tio plaĉas aŭ ne al ateistaj esperantistoj. Tio estas same neneadebla historia fakto, kiel la historia fakto, ke Voltaire estis dikredanta monarkiista burĝo, eĉ se, post sia seniluziiĝo pri Frederiko la IIa, li konsilis en franca lingvo ne labori por la reĝo de Prusujo. Laŭ efektive racia vidpunkto, kio pli konsiderindas, kion homo diras pri si mem, aŭ kion homo efektive faras ? Ĉar mi interesiĝas pri psiko-sociologio (interalie pri psikoj de ateistoj), mi konsideras, kion homo diras pri si mem. Tamen, pli konsiderinda estas, laŭ mi, kio homo efektive estas. Tial laŭ mi ekzistas neniu diferenco inter dikredoj kaj ateistaj religioj. Dikredoj estas la religioj, kies dioj estas nomataj dioj, do la plej raciaj religioj. Ateistaj religioj estas la religioj de tiuj, kiuj estas sufiĉe blindaj por ne nomi siajn diojn dioj, ekzemple futbalismo, esperantismo, raciismo ktp. Same kiel kelta sorĉistino povas sin kredi



katolika, ili kredas sin liberigitaj de religieco pro la nura motivo, ke la vorton "Dio" ili ne uzas. Ĉu liberigas la homaron la malapero de vorto en vortaro ? Ĉu estas racie tion aserti ?

***

Same kiel aliaj ŝtatreligioj, raciismo manifestiĝis per :

- religiaj persekutoj. La Franca Revolucio persekutis ĉiujn malamikojn de la ŝtatreligio, t.e. ateistojn kaj katolikojn. Kredeble estis tiam en Francio pli da katolikoj ol da ateistoj. Ĉiuj francoj scias, ke la franca revolucio gilotinis katolikajn pastrojn kaj ankaŭ katolikojn, kiuj gastigis la pastrojn fidelajn al la papo anstataŭ al la ŝtato. Tio estas konata historia realo (mi ne havas statistikojn pri la nombro de tiuj, kiuj estis gilotinitaj nur pro siaj religiaj konvinkoj). Mi ne scias, ĉu oni gilotinis ateistojn pro rifuzo partopreni en la respublika kulto al la Supera Estanto : la instruistoj, kiujn mi havis pri franca historio ŝajne kredis, ke la franca revolucio estis ateista. Se pasos inter miaj manoj bona libro pri tiu epoko, mi rigardos, ĉu tiu punkto estas precizigita, mi scias nur pri tiu kontraŭateisma ceremonio. Nu, sufiĉe gilotinema estis Robespierre por ke mi kredu, ke tio efektive okazis...

- misioj de konverto en fremdaj landoj. unue, imperiismo poste. Raciistaj misiistoj havis la saman teologian problemon, kiel sankta Paŭlo. Sankta Paŭlo, komence de sia misia agado, kredis, ke sufiĉas informi la judojn, ke Jesuo estas ilia kristo, por ke ili tuj amase konvertiĝu. Bedaŭrinde, la judoj opiniis malsimile. Tial sankta Paŭlo dediĉis la plej longan el siaj epistoloj al tiu ununura problemo : "Nom'de Di', kial ili ne volas adopti mian belan religion ?". La problemon li tute ne solvis, eĉ perdinte multe da argilo (papero ne estis) pri la problemo. Poste Luther deduktis de tiu verko multajn dogmojn, kiuj havis nenion por fari kun la temo de la verko, nome, la pluekzisto de judoj sur la tero. Poste alia germano inventis la radikalan finsolvon de tiu malnova teologia problemo. Miaopinie, tiu solvo certe plaĉus al Luther, kaj ne al Paŭlo, unue, ĉar li estis tamen neperfortema, due,

ĉar li estis judo. Do, same kiel faris sankta Paŭlo, raciistoj iris aŭdigi sian bonan parolon al aliaj popoloj. Ĉar raciismo estas religio aperinta ĉe blankhaŭtuloj pro historiaj motivoj, ĝi ne aperis samtempe en la diversaj kulturoj de aliaj homoj. Do aliaj homoj ne volis konvertiĝi al la religio de blankuloj.

Kiel klarigi tiun rifuzon ? Kiam blankulo vivanta en Okcidento rifuzas racion, lin aŭ ŝin oni ligas sur lito en psikiatriejo : tie izolita li aŭ ŝi plu ĝenas neniun pro sia neracia ekzisto. Ĉe neblankuloj, la solvo de la teologia problemo estas la sama, kiel ĉe la nazioj : Eŭropo estas, kiel diris fama SAT-ano en Rijeka, la lulilo de vera kulturo. Aliaj homoj indas plu ekzisti nur por provizi blankulojn per krudmaterioj, kiujn ili bezonas por fabriki ilojn, kaj por nutri la laboristojn, kiuj ilin uzas (same kiel la tajloro estas ilo por fabriki la vestojn de Voltaire, laboristoj mem estas konceptitaj kiel iloj). Ĉar homo estas racie pensanta besto (kiel ne diris Pascal, ĉar laŭ li homa penso estas religia), sen ia ajn konsciencriproĉo raciisto povas genocidi popolon, kiu ne racie pensas, se ĝia malapero aperas utila al la progreso de la duondioj Scienco kaj Tekniko.

Kial raciismo bankrotas ? Pro la bankroto de la socio, kies religio ĝi estas, t.e. la kapitalisma socio. Homoj komencas kredi, ke ili ne estas sur la tero por fabriki ilojn, kaj komencas paroli pri nula kresko de la ekonomio. Certe sekvos ĝin alia religio. Ĉu dionomanta, ĉu ateista religio, tion mi ne scias, sed tio neniel gravas. Se la homaro intertempe ne ĉesos ekzisti, eble la venonta religio insistos pri la rilato inter homo kaj naturo, kaj konceptos homon kiel unu elementon, inter multaj, de la naturo. Laŭ judkristana vidpunkto, la naturo apartenas al Dio, kaj homo estas nomita de Dio kiel ĝia estro (tion simbolas la kronado de geedziĝantoj en la ortodoksa liturgio). En la marksisma religio, la supereco de homo estas ankoraŭ pli akcentita. Homo homiĝas per sia laboro, t.e., transformante la naturon. Homo ne plu estas reĝo de la naturo (intereso de reĝo estas minimume kontentigi siajn regatojn), sed malamiko de naturo. Krome, ne plu ekzistas la proprietulo, kiu eventuale povus ordoni al sia komisiito respekti la kreitaron. Homo traktas la naturon laŭ



sia bontrovo, tial estas plene libera plufunkciigi la atomcentralon de Fessenheim, malgraŭ la protestoj de malamikoj de la Scienca Progreso, ke ĝi havas fendetojn. Evidente sankta Francisko de Asizo ne estis bona marksisto. La emo nuntempe koncepti homon, ne plu kiel mastron de la naturo, sed kiel unu elementon de ĝi, vekas ĉe blankuloj interesiĝon pri la religioj de alirasaj homoj (ekzemple indianoj).

La demando, ĉu bankrotis racio, supozigas, ke iam homoj pensis racie, kaj nun ne plu. La metinto de tiu demando bonvolu informi min, kiam kaj kie homoj pensis racie. Mi legis en "Sennaciulo" sub la plumo de racireligiano, ke la 20a jarcento estas granda progreso super la antaŭaj jarcentoj, ĉefe super la jarcentoj, kiam homoj estis blindigitaj de superstiĉoj. Tion antaŭvidis Viktor Hugo en sia verko "La légende des siècles" (legendo de la jarcentoj), kie li profetis, ke la 20a jarcento estos feliĉa. Domaĝe, ke li ne informis pri tio 6 milionojn da judoj, kaj plurajn centmilojn da japanoj (inter multegaj aliaj).

La religio, kies dio estas la parto de la homa menso, kiu servas al homo por fabriki ilojn, favoris pliperfektigon de la iloj. Perfekta mortigilo estas ilo, kiu perfekte mortigas. Tial nun la homaro havas la teknikajn rimedojn sin mortigi. La 20a jarcento estas pli danĝera ol la antaŭaj, sed ĝi estas, laŭ mia opinio, nek pli racia, nek malpli racia, ol ĉiuj aliaj jarcentoj.

Terure estas, ne ke nia jarcento ne estas racia (neniam tio ekzistis), sed, ke nuntempe frenezuloj disponas pri teknike perfektaj iloj por frenezadi. Estas urĝe transiri al religio, kiu ne pravigas la fabrikadon de iloj.

Kiel konkludi ? Racio estas vivneceso : neracia homo ne povas sin mem vivteni. Pri beboj kaj debiluloj devas zorgi la socia medio. Sed ni redonu al racio sian veran lokon en homa menso. Racio estas unu el la komponantoj de homa psiko. Malracie estas ĝin diigi.

1980 11 18. Jacqueline.

PS. : Mi pardonpetas pro la longeco de mia kontribuo. Kiel scias multaj legantoj, paŭzoj estas en mia biblioteko iom elastaj en sia daŭro, kaj mi tre interesiĝas pri religioj dionomantaj aŭ ateistaj.

**************************************************
# O N I  R O M P A S  L A  T E R M O M E T R O N
**************************************************

Post la tragedio okazinta en El Asnam pasintan monaton, denove la tero ĵus tremis. En Italio, ĉifoje. Kaj bildoj, ve! jam tro konataj pri ruinaĵoj, el kiuj oni deprenas kadavrojn centope, frontpaĝas en ĉiuj niaj gazetoj. Kvazaŭ por memorigi nin pri la alarmiga malfortikeco de la grundo, kiu nin portas.

Tiu drameca cirkonstancaro des pli draste reliefiĝas la nekredeblan sintenon de la publikaj francaj instancoj fronte al la problemo de la sismoj kaj ties sekvoj. Jen faktoj. Juĝu mem.

* marto 79 : La Buroo pri geologiaj kaj minaj esploroj (BGME) publikigas sismo-mapon de Francio, sur kiu aperas ĉiuj epicentroj de la ĝis nun okazintaj, lokalizitaj tertremoj, prezentitaj simbole per pli-malpli grandaj cirkloj. La mapo montras, ke sismoj kun 9 ĝis 10-grada forto (t.e. maksimuma intenseco) okazis en la proksimo de plej multaj el la lokoj elektitaj de EDF (Elektro de Francio) cele al starigo de atomcentraloj. Tio veras, i.a. koncerne Fessenheim, Creys-Malville, Tricastin, Chinon, St Laurent les Eaux, La Hague.
  Nu, estas konate, ke atomcentraloj kapablas rezisti al skuoj kun maksimume 7 ĝis 8-grada forto. Estas aliflanke sciate, ke kie okazis iam sismo kun 9-10-grada forto, tie nepre okazos alia, samforta.
* majo 79 : Haroun Tazieff, sin pravigante per la donitaĵoj liveritaj de la BGME-mapo, avertas la publikajn instancojn : Atentu ! Lokoj danĝeraj elmetitaj al pli-malpli frua sed nepre okazonta sismo. La franca gazetaro larĝe represas ĉi tiun artikolon.
* junio 79. La admono de la fama vulkanologo efikas. Ĉu rekonsidero al la sekurec-normoj por atomcentraloj ? Tute ne ! Simple aperas nova eldono de la sismo-mapo reviziita kaj... korektita. El ĝi ĉiuj epicentroj kun 9 ĝis 10-grada forto malaperis aŭ reduktiĝis al pinglokapa grando.

Nu, kion pensi pri rega potenco, kiu anstataŭ agnoski siajn erarojn, falsas la kartojn kiel profesia tromplud-anto ĉe kazino ? Kian fidon jam konservi por la estonto al asertoj de teknokratoj, kiuj kapablas vadi en tia ŝlimo ? Kaj kion pensi pri la sano de lando kie, por kuraci febron, oni rompas la termometron ?

P. Signoret.



Red.: "Laŭte" de dec.80 estis jam preta, kiam alvenis tiu ĉi supra artikolo. Sed la enhavo restas brule aktuala.

**************************************************

-nn- sonĝas : ...Se mi estus prezidento en granda
*********** lando kun atoma armilaro...

Iun nokton mi sonĝis, ke mi estas prezidento en granda lando kun atoma armilaro, kun tre alta salajro kaj ĉiuj miaj elspezoj pagataj per la kaso de la ŝtato, kaj ĉi-lasta sen estro, kiu povus eksigi min de tiu tre komforta situacio...

Mia laborkontrakto estis en la tempo limigita.

Ne estante certa sukcesi renovigi ĝin, sed absolute certa, ke ekzistas multaj aliaj pretendantoj por ĉi tiu situacio, mi devis trovi por mi favoran solvon por konservi la oficon.

Nu, mi kunvokis (en tiu situacio oni havas ĉiam multegajn amikojn) estron de tank-sekcio. Kun li mi interkonsentis, ke antaŭ la dato de la fino de mia nuntempa kontrakto li ekokupos - sen tro uzi siajn armilojn - la ĉefurbon per siaj tankotrupoj, proklamos min dumviva prezidento kaj poste ni rendevuos denove...

....

Tio estis mia sonĝo... kiam la matena sonorilo min vekis por ke mi reiru al mia peniga laboro...

En kantino, dum tagmanĝo, mi rakontis tion kaj demandis mian kamaradon, fakestron :

"Kion vi farus, se ĉi tio okazus morgaŭ aŭ postmorgaŭ?"

Li min respondis sen pripenso : "Mi irus tuj hejmen kaj rigardus la televidon..."

-nn-

## Kiel disvastigi Esperanton ?

Jen problemo pri kiu ni devas ĉiam pli adekvate al ŝanĝiĝantaj kondiĉoj kaj al niaj propraj konceptoj pritrakti ! La disvastigo de nia ideo estas tre kompleksa fenomeno, al kiu intime kunligiĝas la informado, instruado kaj diversspeca aktivado. Mi ne eniras en la detalojn, sed volas emfazi nur kelkajn tute ĝeneralajn punktojn.

1) Ni bezonas varbi por Esperanto kiel aktivajn uzantojn de la lingvo nur duonan promilon de la homaro ; do ne estas superforte varbi en ĉiu loko unu personon el 2000 por nia afero. Havante ĉ. 2.000.000 aktivulojn en la mondo ni estos decida faktoro en la homara evoluo. Ĉar en nia "super-establita" Eŭropo ni havas egajn malfacilojn konverti miope egoismajn "tro-ŝarĝitojn" por nia afero, ni povas disvastigi Esperanton ekz. en Vjetnamio, sendante nebezonatajn lernolibrojn tien. Franclingvaj aŭ rektametodaj lernolibroj, per kiuj ni jam lernis la lingvon, se ne tro makulitaj, bonege servas tie, kie mankas papero kajsekve lernolibroj, sed ne entuziasmo por lerni la lingvon. - Cetere, mi ĵus sendis 3 kilogramojn da lernolibroj al VPEA en Hanojo kaj la poŝtkosto egalis al unu botelo da Bordeaux Blanc ĉi tie en Finnlando.

2) Ni devas ĉiam peti subvenciojn de la socio, ĉar ankaŭ aliaj ilin ricevas. En Finnlando la komunumoj disdonas subvenciojn por komunutilaj societoj. Mi povas mencii kelkajn rezultojn : en Kuopio ni ricevis en 1980 1700 fmk (en antaŭaj du jaroj po 1500 fmk), en Iisalmi 800 fmk, en Tampere 2200 fmk ktp (1FF = 0,80 fmk). Ŝajnas ke niaj homoj aŭ ne scias pri tiaj ŝancoj aŭ estas tro pigraj ion fari. Sed pensu, se ĉ. 2000 E-societoj (registritaj jure) en la tuta mondo ricevus subvenciojn, ni povus esence plirapidigi nian antaŭeniradon en multaj kampoj.

3) Ni en Kuopio fondis kluban bibliotekon, kiu komence de novembro de 1980 ampleksas ĉ. 1500 volumojn. La E-biblioteko estas nemalhavebla por serioza esperanta aktivado. Por financi ĝin, ni procedis jene : ni petis heredantojn de postlasaĵoj de forpasintaj E-istoj transdoni



esperantaĵojn al ni kaj poste ni povis utiligi la duoblaĵojn kiel interŝanĝekzemplerojn kun aliaj kolektantoj. Ni utiligis la urbajn subvenciojn por aĉeti kostajn volumojn. Ni aranĝis specialajn botelkolektajn kampanjojn inter niaj membroj, kiuj petis ilin ĉe siaj najbaroj k.a. En Finnlando ekz. vodko-, limonadbotelo kostas 0,30 fmk. Facile ni povis kolekti kelkajn centojn.

4) Ni utiligu maksimume volontulan laboron, ĉar la salajrata oficistaro konsumas ne nur sian salajron, sed plej diversajn pagojn de asekuro, pensio k.a., tiel ke estas tro pene per etaj kotizoj ĉion tion plenumi. La laboro por Esperanto estas granda ĝojo kaj privilegio, kondiĉe ke ni povas paperon kaj presigon akiri ne nur el la propra poŝo.

S.P. Hurtta

## broŝurservo

Jen bilanco de la broŝurservo por 1980. Ĝi reliefigas la intensan aktivecon dum la pasinta jaro, ĉefe pro la eldonoj de "Kiel diri". El la pozitiva saldo ne estas dekalkulita la elspezo por "Inter Sovetaj Popoloj" - nun preskaŭ preta.

| | | | |
|---|---|---|---|
| Vendado + monprovizoj | 21849,16 | Eldonado | 13231,50 |
| Donacoj | 95. | Afranko | 3227,60 |
| Ĝiroj | 38,30 | Transĝiroj | 308. |
| FF | 21982,46 | FF | 16767,10 |

Jara bilanco : + 5215,36
antaŭa saldo : + 5874,15

Nova saldo : 11089,51 FF.
(el tiu sumo 6840 estas ŝuldo al monprovizintoj)

Pro la peza afranko mi sendas nur unu fojon jare en 1 paketo la eldonitaĵojn. Post du monatoj, kiam IS estos preta, okazos tiu sendado. Samtempe mi informos ĉiun pri la sumo restanta en la konto. Anstataŭ aparte pagi por "Laŭte", broŝurabonantoj, kiuj abonas ankaŭ al la bulteno, povas simple ĉerpi el sia broŝurkonto por pagi la bulten-abonon. Tio iom simpligos la kotiz-formalaĵojn.

Precizigo : Por la broŝuroj ne ekzistas jara abono. La minimuma pago 50FF taŭgas ĝenerale por ricevi la novajn tekstojn dum du jaroj, sed tio kompreneble dependas de la amplekso de la eldonitaĵoj.

Kribo.

Nia novjara rakonto :

# La sukermigdaloj

Ni estis geknaboj dekkvar-dekkvin jaraĝaj. Estis post la Kristnaska libertempo, dum la unua tago de la reveno al la lernejo. Dum la paŭzo ĉiu emfazis pri la donacoj ricevitaj de la parencoj, kaj pri la festaj tagoj nun foririntaj.

Bernardo estis lernanto, kies gepatroj multe ŝparis el siaj salajroj por pagi la filajn studojn. Tiutempe oni pagis la liceajn studjarojn, kaj malmultaj estis la stipendioj.

Bernardo ĉiam vestita je la limo de deco, sen poŝmono, malofte povis konkurenci la farojn kaj dirojn de la burĝaj infanoj, siaj kolegoj. Pri tio li iomete suferis, ĉar li estis sufiĉete fanfarona. Des pli, ke niaj klasoj estis tiam geklasoj. Revoluciaj klasoj ! De antaŭ unu jaro knabinoj kaj knaboj sidiĝis en la samaj liceaj ĉambroj. Estis tempesto en la urbeto kaj en la ĉirkaŭaĵoj. Kompreneble, la inaj vicoj kaj la viraj vicoj enklase ne miksiĝis. Tute same kiel en la preĝejo. Dum la paŭzoj malsamaj ludkortoj kunigis knabinojn kaj knabojn.

Sed ni revenu al Bernardo. Glora tago estis por tiu ĉi. De sia hejmo li alportis imponan papersaketon da sukermigdaloj. Prince li regalis nin dum la paŭzo. Sed ankoraŭ pli bone estus regali la knabinojn. Ĉar la ludkortoj estis malsamaj, tia nobla donaco nur enklase povus okazi.

Taŭgis la venonta studklaso. Estris ĝin bonkora homo, kiu ne volonte punis lernantojn. Iomete traŭmatizita de la "Granda Milito", li malfacile trudis sian estrecon dum la studoj. Kompreneble, la sanon de la profesoro ne kompatis la gelernantoj. Male, ili plenplene profitis la situacion por libere kaj tumulte agi dum la kursoj. Facile kaj senpripense estas kruelaj la infanoj.

Finita la paŭzo. Nu, ni eniris la klasĉambron de tiu malfeliĉa profesoro. Tie la geviroj pli-malpli estis miksitaj. Bernardo sidiĝis sur benko antaŭ skribotablo okupata de du junulinoj. Tri minutojn poste, ne turnante la kapon, la bombonujon li prezentis, super sia ŝultro, al la lernantinoj. Ridetante, la du knabinoj senprokraste enprofundigis siajn manojn poŝen. Tiu saketo kliniĝis teren, kaj... rezulto tuj sekvis. En la silento sekvanta la tumultan instaladon de la gelernantoj oni klare aŭdis kaskadan kraketadon. Estis la bombonujo malpleniĝanta sur la tablon. Tiuj bombonoj ĝoje resaltante sur la lignon, disŝutiĝis planken. Tuj la najbaroj plonĝis sub la benkojn por rikolti tiun sukeran manaon. Operacio ne silenta, evidente, kaj substrekita de la ekkrioj de la junulinoj premantaj la genuojn kontraŭ la eblaj tro rigardemaj okulvidoj de la plonĝantoj.



Sed ankoraŭ ne estis la apoteozo ! La tro afabla Bernardo ankaŭ aŭdis la bombonan krepitadon. Post kelkaj sekundoj da konsterno li vigle reagis. Por ĉesigi la bruon kaj la bombonan elfluon, la donacanto rektigis rapide la saketon kaj revenigis ĝin ĉiam superŝultre ĝis la antaŭa pozicio. Ve! Bernardo forgesis ion : malfermita estis la saketo. El la skatolo trairanta energian duoncirklon elspruĉis la tuta bombona restaĵo. Kun hajla bruo falis pluvo da sukermigdaloj sur la plankon, la tablojn, kaj kelkajn mirantajn kapojn. Tiam torentis la gelernantoj. Ĉiuj eksaltis el siaj seĝoj, kaj rideksplodante, interpuŝiĝante, la gejunuloj lerte zorgis pri tiu neatendita plukado. Plenplena estis la tumulto.

Kaj la profesoro ? - Kolere li pugne frapis sian skribotablon, plengorĝe kriante : "Silentu! Silentu! Reiru al viaj seĝoj!" Tiel li nur egigis la bruon.

Fine, kun vangoj misformitaj de la rabitaj sukeraĵoj, la kunplukintoj disŝutiĝis. Ĉiu sidiĝis por kviete gustumi sian kaptaĵon.

Tiam falis la konkludo de la batalo : "Bernardo, du horojn da puno !" Sed Bernardo nur du fojojn en tri monatoj revenis hejmen. La puno ne tro tiklis lin. Eĉ eble la bonkora profesoro bonvolos forgesi, se oni haltos antaŭ li kun malsekaj okuloj...

Ĉiel estas la celo trafita : Bernardo malavare regalis la gekolegojn kaj per la bombonbatalo li fariĝis la heroo de la nuntago.

M. Moreau.

En tiu ĉi rubriko,
la reagoj pri jam
aperintaj artikoloj...

# ĈIES TRIBUNO



## Jacques Duboin kaj Disdona Ekonomio

********************

Ĉu Berneri, la aŭtoro de la artikolo parte prezentita en Laŭte (n°31,p.4), estis informita de la ideoj de Jacques Duboin, kiu ekde la tridekaj jaroj batalis en Francio kontraŭ tiu ekonomio de profito, kiu en abundeco alportas mizeron ? Same D. demonstris, ke socio sen mono estas la nura, kiu taŭgas en la nuntempo kaj same refutis la kontraŭajn argumentojn.

Jen do skemo de la Disdona Ekonomio (mi preferas la vortojn "Disdona Socialismo") proponita de D. kaj ekde 1934 klarigita en la de li fondita gazeto : "La Grande Relève des Hommes par la Science" (La Granda anstataŭigo de la Homoj fare de la Scienco). Eldoniĝis plie broŝuroj kaj libroj de li.

Ĉar la maŝinoj kapablaj anstataŭi la homan laboron produktas pli kaj pli, en preskaŭ ĉiuj fakoj, materiaj kaj mensaj, plie ĉar ni ĝuas la akirojn de niaj antaŭuloj, estas nenormale, ke iuj suferas malsaton kaj aliajn diversajn mankojn, dum oni detruas manĝaĵojn, varojn, pro abundo faliganta la prezojn, do la profiton ; pro la manko de profito oni maldungas, la senlaboruloj ne aĉetas...ktp, la rekantaĵo estas senelira cirklo.

Ne rilatigi la aĉetpovon kaj la laborenspezon, jen la fundamenta principo starigita de D. De la naskiĝo ĝis la morto, ĉiu individuo ricevas Socian Enspezon, kiun neniu imposto, takso, ŝanĝos. Tiu konsummono valoras dum nur limigita tempo (unu, aŭ maksimume du jarojn) por akiri la bezonaĵojn; ĉu produktojn ĉu servojn. Tiujn necesaĵojn produktas aŭ plenumas ĉiuj individuoj, kies kapablo, sano, aĝo ebligas tiun Socian Servon. Kompreneble estas necese plani la produktadon laŭ la veraj bezonoj, plani la gravecon de la servoj, kaj ankaŭ la daŭron de la laboroj por juste dispartigi ilin, tiu daŭro malgrandiĝos pli kaj pli pro la novaj malkovroj.

Tiu ekonomia planado komenciĝas ĉe la plej malgranda komunumo kaj ĉe tiu punkto Berneri kaj D. ankoraŭ akordas, per starigo de vera socialismo. Tiu sensanga revolucio sensklavigas la homon koncerne liajn bezonojn, donas financan sendependecon al la virinoj, permesas al ĉiuj infanoj atingojn laŭ ilia natura kapableco.

Tio estas nur resumo de la ideoj de D. Mi esperas, ke refutoj, prezentadoj de similaj teorioj (Bellamy, Socikredito, Monda Socialismo) nutros la debaton. Hispandevena Kamaradino okaze de frakcia kunveno en SAT-Kongreso citis la ekzemplon de funkciado de Disdona Ekonomio dum la civila milito, eble en Aragono, mi ne plu certas. La linioj, kiuj sekvas la cititan artikolon de Berneri pri nova socio, montras trafe kion mi agnoskas la vera socialismo.

Andreo.

## Pri datoj !

**********

Mi ne intencas eniri la debaton pri la franca E-movado, sed mi ne povas preterlasi la rimarkojn de R.PONS pri la datosistemo (1979 08 03) kiun li tiel malŝatas. Tiu formo fontas el la rekomendaro SI(*) kaj ĝi venas kune kun similaj rekomendoj favore al metrigo, decimaligo kaj adopto de unuoj por mezurado de energio (ĵulo), frekvenco (herco), kapacitanco (farado), induktanco (henro) kaj multaj aliaj.

Sinjoro PONS rajtas laŭte protesti (kiom da decibeloj ?) se li ne ŝatas tiun sistemon, sed li ne pensu, ke tio estas "angla-usona" entrudiĝo - TUTE NE ! Ĝi estas tre malmulte konata en Britio kaj neniom, laŭ mia kontrolo, en Usono. Ĉefan influon ĝi ŝajne ĝuas (a) en Skandinavio (b) en Nederlando (c) en bibliotekoj kaj ĉe komputoristoj kie oni ŝatas la logikan ordon, ĉar logika ĝi ja estas - tre taŭga por la

-------

(*)SI = mallongigo uzata en Britio kaj verŝajne aliloke por la franclingva Système International d'Unités kiun subtenas diverslandaj normigaj institucioj.

por la klasigado de informo laŭ datoj (ankaŭ en la komerco). Kaj mi kredas, ke ĝi estas jam delonge la akceptita maniero skribi datojn en Ĉinio.
Vi ne povas alkutimiĝi ? Ĝi sekvas nian normalan manieron esprimi sumojn kaj kvantojn per simboloj (ciferoj) kiuj komenciĝas ĉe la plej altvalora unuo : 1 metron 70 (la 1 metro valoras pli ol la 70 centimetroj); 2 frankojn 50 (la 2 frankoj pli ol la 50 centimoj) ; 3 horojn 40 minutojn (simile) ktp.

Ĉar E-istoj estas ĝenerale progresemaj, la rekomendita datoformo estas relative vaste aplikata en Esperantio. Mi tuj konfesu, tamen, ke restas ioma lingva problemo tiurilata, nome, ke ni tiamaniere ne plu skribas datojn laŭ la sama ordo kiel ni ilin eldiras. Sed tio ne estas nur E-lingva problemo ; ĝi estas tiu sama kiun renkontas (a) la germanoj ĉe la numeraloj : 26 = sechsundzwanzig, kaj (b) ni ĉiuj se ni skribas Dkr 5,60 ; 1,50 m. ; 3,70 FF.

1980 12 14 John Rapley

## Mia vidpunkto (*)
**************

Antaŭe la Racia Kurso enhavis bildojn kaj tekstojn, kiuj estis revoluciemaj kaj tio ne plu taŭgas por nia epoko. Mi eĉ konstatis ĉe l'fino de la Rijeka Kongreso, ke malmultaj povis kanti "la Internacion". Rimarku : en la manifestacioj oni kantas, fuŝante la arion, nur la rekantaĵon... Do prave oni elektis por la Nova Racia Kurso neŭtralajn tekstojn por pli facile disvendi ĝin. Sed oni troigis, indikante ke la libro estas eldonita de SAT-Amikaro, tio nenion signifas por neesperantisto aŭ por esperantisto ne konanta la movadon...
Sed laŭ mia vidpunkto la prava kritiko farebla al multnombraj aŭtoroj de nia lernolibro estas ke ili kredis pli bone fari ol Jean Habert kaj Marcel Boubou, dum ili havis kun la FEP-lernolibro bonegan modelon (krom la stalinista teksto kiu nun ridigus eĉ Georges Marchais). Ili ĉion flankelasis... Tiuj, kiuj posedas ĝin, povas ekzemple vidi

---

(*) Vidu "Laŭte" n-ron 30, p.21.



la ilustritan klarigon pri SIA (paĝo 95) kaj bedaŭri ke oni nenion prenis al tiu bonega verko.

Pri la landnomoj la FEP-lernolibro havis progreseman sintenon : UJO = skatolo. Uzita kiel afikso por landnomoj devas esti konsiderata kiel arkaismo.
LANDO : nur valoras por unusilabaj landnomoj : Skotlando, Greklando. Evitenda en plursilaba landnomo (Jugoslavlando) aŭ kiam eŭfonio ne permesas : Franclando.
IO : konsiderata en la jaroj 1930 kiel neologismo, estas pli internacia kaj rekomendata en nia medio : Italio, Jugoslavio, Albanio estas ja tuj komprenata eĉ de ne esperantisto.
Antaŭ 1914 la partizanoj de ĝeneraligo de "lando" por ĉiuj landnomoj svarmis... ili malaperis kiel la dinosaŭroj. Oni vidis revuon kun titolo "Tra Provenclando". Tio signifis "Tra Provenco". La revuo aperis nur unufoje. Tion devas scii la arkeologoj !
Post malapero de la dinosaŭroj estis du kampoj : la UJanoj ĉefe en la burĝa movado ; ili sin apogis sur la Akademio kaj batalis kontraŭ la IO-anoj, kiujn oni ĉefe trovis en laborista movado kun kelkaj inteligentaj progresemaj neŭtraluloj sin apogantaj sur la natura evoluo kaj la internacieco. Ili estis konsiderataj kiel brulendaj herezuloj danĝeraj por la estonto de la lingvo !
Revenante el SAT-Kongreso de Helsinki en 1958, mi du tagojn haltis en Majenco por helpi geamikojn miajn ĉe L.K.K. de la UEA Universala Kongreso. Deĵorante ĉe giĉeto, mi disdonis la kongresdokumentojn parolante kiel mi kutimas. Mi ne povis eviti disputon kun sinjoro, kiu prezentiĝis kiel prezidanto de la Sveda E-Federacio. Tre akre li protestadis pro uzo de "hereza sufikso" IO por landnomoj en UEA-kongresejo... Kiam la Kongreso malfermiĝis, mia Svedo sidis en la unuaj rangoj kaj mi klopodis deĵore stari proksime por vidi la reagojn de mia persekutinto, ĉar mi sciis, ke la UEA-prezidanto LAPENNA pionire en la burĝa movado uzis la de ni uzatan formon IO por landnomoj. Imagu kiel mi ridegis.
Laŭ mia vidpunkto, por grandkvante disvendi en ĉiuj medioj nian lernolibron oni adoptis neŭtralan tekston sed en parolkursoj oni povas adapti komentojn laŭ tendenco de la lernantaro ekzemple la patrino povas ĵus reveni el MLF, la patro povas esti senlaborulo leganta anoncojn por trovi

laboron, ktp...

Al Kdo S.P.H. pri la titolŝanĝo de nia organizo, mi konsilas atendi tridek jarojn por maturigi la ideon. Atendante ni kuraĝe ekzamenu la perspektivojn de nia lingvo kun la SAT-ŝildo.

LUPO
16292.

P.S. Fininte mian artikolon mi konsultis la FEO Racian Kurson (3a eldono 1931). En la 11a leciono de la komplementa parto mi legis pĝ. 184. La teksto pri landnomoj estas preskaŭ sama kiel tiu de la lernolibro de FEP. Mi konsultis ankaŭ la "Praktikan Kurson" (eldonis en 1939 Centra Esperantista Librejo). Tiu libro estis kopio de la FEO Racia Kurso sed kun tekstoj taŭgaj por la neŭtraluloj. Nu pri landnomoj nenia ŝanĝo... Mi lasas la legantaron de "Laŭte" konkludi. Kun la espero ke niaj kamaradoj faros pli bone okaze de la dua eldonO.

LUPO.

## Al la SAT-gejunuloj

Mi deziras komenti al la Raporto pri la Internacia Renkontiĝo de Junaj Geesperantistoj de Michel Bauret, ke por informado pri okazontaĵoj estus tute facile eldoni folion kiel faras SAT en Britio : multobligitan, nacilingvan, kiu donas koncize la daton, okazontaĵon kaj kontaktadreson. Tion oni povas disdoni al ne-esperantistoj kaj aldoni al unu el la SAT-eldonaĵoj por disdono inter esperantistoj.

Ĉe ni ĝi aperas ĉiumonate interne de "Worker Esperantist" sed haveblas ankaŭ aparte kontraŭ ĉirkaŭ 20 centimoj.

Cetere, ĉiujare Heroldo de Esperanto havas gigantan liston de ĉio kio okazos tiun jaron en la esperanta mondo - kompreneble necesas, ke la redaktantoj ricevu la informon de la organizantoj !

Helga Rapley.

**Pri "La Juna Penso"** : De la 1a de januaro 1981, LJP ne plu havas leĝan responsulon! Se SAT-junul(in)oj deziras plu aperigi LJP-on en Francio, ili nepre trovu inter si tian responsulon. Tiu tuj rilatu kun mi por rapide solvi la formalaĵojn.

C.Baudé

# ĴUS APERIS



# LEO TOLSTOJ

"El verkoj de Leo Tolstoj". Eldonaĵo de SAT-broŝurservo. 76-paĝa. 6 FF.

Sub 4 malsamaj titoloj, ĉiu detale esplorita, Tolstoj traktas pri la samaj kernaj temoj : homaj solidareco kaj libereco. Nia sociordo estas klarvide observata kaj profunde primeditata.

En "Patriotismo kaj Registaro" li klarigas ties naskiĝon, iliajn celojn kaj kultivadon fare de ĉiuj, serve al la regantaj klasoj.

Tio lin kondukas al "Alvoko al politikistoj", por ke ili ne defraŭdu siajn informojn, konojn, povojn moralajn kaj teknikajn por sia nura profito, sed ilin konigu al ĉiuj. El tio sekvas, ke ĉiu sintenu laŭ religia kompreno de la vivo, obeante al leĝoj pli universaj kaj liberigaj ol la homa. La plej grava estas : "Kondutu al la aliaj, kiel vi volas, ke la aliaj kondutu al vi", alidire :"Amu vian fraton, kiel vin mem".

"Ĥodinka" montras, ke la homo kapablas la plejbonon kaj plejmalbonon spite al sia sociklaso. La gajnavido estas universala kaj facile nin brutigas. Tamen, eĉ en la plej malbonaj momentoj, estulo povas reprudentiĝi kaj esti vere homa. En feliĉo, same kiel en malfeliĉo, ĉiuj estas egalaj. Bedaŭrinde ŝajnas, ke nur en malfeliĉo tion oni ekvidas.

"Ne mortigu" traktas pri "leĝa murdo" nomata ekzekuto okaze de justica decido, revolucio, milito , kaj pri "eksterkutima" murdo. Ambaŭkaze estas "Okulon pro okulo, denton pro dento". Preskaŭ ĉiuj aprobas la unuan kaj kondamnas la duan. La popolojn generas reĝoj, ŝtatoj, sed la malo same veras. Do, por ke ŝanĝiĝu la nuna situacio nur unu solvo : Ĉiu ekkonsciu pri sia responso kaj sintenu konsekvence *.

* "Se la homaro volas pluvivi, ĝi ŝanĝu sian pensmanieron" (Einstein)

La antaŭparolo de R. Rolland estas tiel altnivela, kiel la tekstoj.

Resume, 73-paĝa libreto leginda kaj meditenda, kvankam la esperantigo de "Patriotismo kaj Registaro" estas iom peza. Plia argumento por aĉeto, ĝia kosto : 6FF.

Ĉio tio povus esti okazo de paraleligo kun la "familia socio" kaj trakti pri gepatraj/gefilaj rilatoj, pri edukado : ĝiaj celoj, sekvoj, ktp...

J.C. Gionco.

# VIVO DE "LAŬTE!"

Bilanco de "Laŭte!" en 1980 : 281 abonoj (232 en 1979).

| | | | |
|---|---|---|---|
| Abonoj | 3793,97 | Eldonkostoj | 2267,60 |
| Donacoj | 269. | Afranko | 680,80 |
| | 4062,97 | | 2948,40 |

Saldo : 1114,57 + antaŭa saldo 1279,31 = 2393,88 FF

Ĉi-lasta sumo entenas la monon de 150 abonoj por 1981, jam registritaj antaŭ la 31a de decembro '80. Do, konstatu mem, ke ne estas sufiĉe en la kaso por longe bankedi!...Tial la abonkosto plialtiĝos iomete ĉi-jare : 14/18 FF. Reabonontoj profitu la malnovan tarifon (12/15FF) ĝis la fino de februaro 81. Same, la kasisto fermos la okulojn, malfermante la monujon, por enkasigi la novajn abonojn je la malnova tarifo ĝis la sama dato.

La varbado de novaj legantoj dependas de la jama abonantaro. "Laŭte!" ne disponas sufiĉajn rimedojn por reklami en la plej gravaj E-gazetoj. Ĉiu amik(in)o de "Laŭte!" povas mem varbi ĉirkaŭ si. Ni volonte sendos specimenon de la bulteno al viaj gekonatoj komisie de vi, se vi tion petos. En 1981 ni klopodos liveri 8 numerojn, spitante la oficialan dumonatecon de "Laŭte!".

Ĉi-foje, por aperigi kiel eble plej diversajn kontribuojn, ni ne povis trovi lokon por la felietonoj. Same, pro lokmanko, ne eblis aperigi la modifojn al la pasintjara "Adresaro". La abonantaro paciencu ĝis majo/junio, kiam aperos la nova eldono, kun multaj novaj adresoj, sed ankaŭ forstreko de multaj, ne plu validaj. Kiel migrema estas la E-popolo nuntempe !

Kribo



## Kio estas kamomilo ?

********************

Kamomilo (laŭ PIV) : 1)G. (Matricaria L.)el kompozitacoj de unu- k dujaraj herboj, el kiuj la plej konata specio (M. chamomilla L.) estas unujara herbo (..!), la amara ekstrakto de la floroj (-a teo) estas kvietiga (k ŝvitiga). 2)Infuzo de -o.

Rim.: Laŭ PIV kamomilo = matrikario, konsekvence ĉiuj matrikarioj estas kamomiloj. Ne, ĉar iuj matrikarioj ne estas uzataj medicine : m. discoidea, m. inodora ekzemple.

Antemido (laŭ PIV) : unu- du- k plurjara herbo (de la g. Anthemis L.) el kompozitacoj... Vd. kamomilo.

Rim.: Necesas precizigi, ke nur antemido nobla (Anthemis nobilis) estas uzata kamomile.

Matrikario (laŭ PIV) = kamomilo.

Rim. : Ĉar matrikario kamomila estas la plej uzata k la plej bonefika kamomilo, laŭ opinioj de fitoterapistoj, necesas pli detale precizigi tiun vorton.

### Ekster-PIV-aj rimarkoj

En Francio vendiĝas en apotekoj preskaŭ nur antemido nobla. En Gaskonio (verŝajne ankaŭ aliloke) oni trinkas kamomile Chrysanthenum parthenium (grande camomille), malagrabla infuzo ! Ĉu ankaŭ aldoni al tiu kamomila ĥaoso la ekziston de "kamomiloj" (almenaŭ en Franclingvio) ne uzataj medicine : anthemis cotula (camomille puante), anthemis montana (camomille des montagnes), anthemis altissima (grande camomille)?

---

Ĉio ĉi montras misuzon de la vortoj kamomilo, antemido, matrikario kaj necesan precizigon de iliaj signifoj, kiuj povus esti jenaj, anstataŭ tiuj de PIV :

Kamomilo : Infuzo digestiga, kvietiga, ŝvitiga de plantoj el kompozitacoj : matrikario kamomila, antemido nobla.

Antemido : Aldoni post la 5a linio de PIV : Antemido nobla (A. nobilis), uzata por infuzo digestiga, kvietiga, ŝvitiga; vd. kamomilo.

Matrikario : Meti ĉi tie la tekston, kiu sekvas la vorton : kamomilo.

Se, laŭ vi, leganto, tiu propono ne taŭgas, bonvolu mem respondi al la demando : Kio estas kamomilo ?

E. Dazun.

HOMOHEJMO ESTAS TERO.

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

1a strofo

Ĉu necesas provi kosman aventuron ?
Ĉu necesas blinde fuĝi for el Tero,
Por plusperti sammizeran fifuturon,
Plu servuti en socio sen mistero ?
Ĉu utilas peni por nur iluzio ?
Homo ĉiam estos fia detruanto :
Ju pli vasta estos ĝia Mondvizio,
Des pli peza iĝos ĝia penokvanto. (al rekantaĵo)

Rekantaĵo

Homohejmo estas Tero,
Do, pro emo nur perverso,
Ni ne faru ĝin kancero
De la tuta Universo.
Ni prefere kunprofitu
Homsocian harmonion,
Kaj de ĥoroj ni aŭskultu
La porpacan simfonion.

2a strofo

Tro grandskale ja sterniĝas for la Kosmo,
Analogas de ĝi nura sekundeto
Milionon da mezvivoj de Terhomo,
Kaj pro tio plej maleblas mempercepto.
Sekve, kial daŭre peni por konstrui
"Piramidojn" de Scienco kaj progreso,
Kaj senĉese senkonscie sin detrui ?
Stulte spiti naturleĝojn sen neceso (al rek.)

3a strofo

Iom da nur tuthomara bonvolemo
Ja sufiĉus por tuttera "idilio",
Por ke l'homa vivo iĝu sen problemo,
Ke l'Homaro finestiĝu "familio".
Ne eliru ni el nia propra "sfero",
El natura la medio homkonvena,
Ne detruu Teron ni pro tro da klero,
Kaj la homa vivo iĝos ja serena. (al rekantaĵo)



4a strofo

L'Universo mem eterne evoluas
Sen bezono de la helpo Terohoma,
Kaj la Tempo riveregе daŭre fluas
Sen atenti pri la homa peno kroma.
Perturbanto povas esti nur la Homo,
Alcelante memstarigi novfuturon ;
Dum ĝi povus, sen tro zorgi pri l'atomo,
Plenĝuadi plej normale la Naturon. (al rekant.)

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

En Eymet la 28an/01/1979.

B.G.D.

********************************************************

Neindulgaj punoj al la antinukleaj manifestaciantoj !

************************************************

Du procesoj okazis la 12an kaj 19an de decembro 1980. La unua (4 kulpigitoj) pro manifestacio kontraŭ la enketo pri publika utilo de atomcentralo en Golfech la 17an de novembro 1979, la dua (6 kulpigitoj) pro translokigo de EDF-oficejo en Golfech la 2an de decembro 1980. La nuraj atestoj aŭtentigitaj estis tiuj de la policistoj, de la akuzantoj. Jen la verdikto :
- 3 monatojn da malliberejo kun prokrasto por 7 el ili ;
- 6 monatojn da malliberejo kun prokrasto por la 3 ceteraj.

La plendanto obtenis 4463,97 FF por repago de siaj elspezoj. Kaj sur la loko mem en Golfech ĉiam la sama malkvietiga spektaklo !...
Morala kaj ideala subtenoj ne plu sufiĉas. Monsubteno estas necesa. Jen adreso : CAN Golfech, 32 bd. Victor Guilhem, 82400 Valence d'Agen, Francio. Jara abono al "Le Géranium enrichi" : 40 FF en Francio. 50FF ekster Francio, samadrese.

Nacia kampanjo por garantii rajton al militrifuzo okazas nun pere de M.A.N. (Movado por Neperforta Alternativo). Por pli da informoj, eblas skribi al: MAN-Gironde, 47 rue de la Devise, F 33000 Bordeaux.
Lanza del Vasto mortis la 6an de januaro. Tiuj, kiuj partoprenas la reziston sur Larzako kontraŭ la disvastigo de la militkampo, la neperfortemuloj scias kiom valoraj estis lia ĉeesto, liaj agadoj. <u>Nikola</u>.

VENONTA NUMERO DE "LAUTE" : <u>fine de februaro</u>.

Dir.de publication & imprimeur: Baudé, 47340 Laroque Timbaut

## E-VIVO

Nederlanda Esperanto-Kongreso
******************************
24a/26a de aprilo 1981,
Oud-Leusen, komunumo Dalfsen.

De la 24a ĝis la 26a de aprilo 1981, okazos la Nederlanda E-Kongreso en la moderna konferencejo "De Bron", kiu troviĝas en la komunumo Dalfsen, en la orienta parto de Nederlando. La regiono estas riĉa je naturo kaj la konferencejo situas apud la rivero Vecht. Ekzistas eĉ ebleco kampadi apud la kongresejo. La kongresejo estas bone atingebla per aŭtomobilo kaj ankaŭ trajne/aŭtobuse. Por tiuj, kiuj alvenos vendrede (inter la 16a kaj la 18a) estos organizita veturado el la stacidomo de Dalfsen al la kongresejo.
Centra temo de la kongreso estos "Energio", lige al la en Nederlando okazonta t.n. larĝskala socia diskutado pri energioprovizado. Pri tiu temo prelegos prof. Dr. Otto Haszpra, **hungara scienculo** kaj la franca medio-aktivulo Roland Levreaud. O. Haszpra prelegos ankaŭ pri la aplikado de Esp-o en la sciencoj.
Estas la intenco eldoni specialan kongresan dosieron pri la energio-problemaro. Dimanĉe posttagmeze okazos kulmine forumdiskutado kun partopreno de diversaj nederlandaj politikistoj en antaŭbalota periodo.
Dum la kongreso okazos sabate la jarkunvenoj de kelkaj el la nederlandaj E-organizaĵoj, kiuj ĉiuj kune organizis la kongreson, la unuan komunan kongreson. La teatra grupo TESPA el Parizo prezentos sabatvespere teatraĵon de la moderna franca aŭtoro Boyer.
La kostoj de la kongreso, inkl. ĉion, estas 137,50 gld., se oni aliĝas antaŭ la komenco de la jaro 1981a. Por gejunuloj estas malpli kosta tarifo, nome 100 gld, se oni pretas dormi en granda salono. Aliĝilojn oni povas peti ĉe la kasisto de la Nederlanda E-Kongreso, Hoeveweg 18, NL 8394 VR De Hoeve, Nederlando. Ĉe li oni samtempe povas mendi kongresglumarkojn (0,75 gld por folio de 10 markoj), kiu montras la emblemon de la komunumo Dalfsen kaj modernstile mencias pri la kongreso.
NEPRE ni kore bonvenigos eksterlandajn partoprenantojn, do NE HEZITU !
Por pliaj informoj : sekr-ino Nederlanda Esperanto-Kongreso S-rino I. Boode, Polderlaan 46a, NL - 3074 ME Rotterdam.

**********************************************

5a ĝis 9a de Junio 1981. - Oficiala programo

V.5an de junio: Akceptejo malfermita ĉe la Palaco de la Kongresoj, Promenado de la platanoj, je la 14a. Je la 20a : Interkona vespero ĉe la "Cafeteria", Pal.de la Kong.
S.6an de junio: Estrarkunveno je la 9a. Je la 10a : Inaŭguro. Je la 12a : Honora Vino. Je la 15a : Publikaj debatoj pri minoritataj lingvoj kun partopreno de reprezentantoj de Katalunaj Kulturaj Centroj el Barcelono kaj Perpignan. Je la 20a : Arta Vespero.
D.7an de junio : Je la 9a : Konsilia Kunveno. Je la 10a: Ĝenerala Kunveno. Je la 14a : Konsilia Kunveno. Je la 15a: Ĝenerala Kunveno (2a parto). Je la 17a : Fakaj kunvenoj - G.E.E. Je la 20a : Bankedo kaj Balo ĉe restoracio "Le Rallye" Place des Variétés, apud Promenado de la Platanoj.
L.8an de junio : Je 8h30 : Estrara kunveno. Je 9h30 : Konsilia Kunveno. Je 10h30 : Praktika kunveno : "Kiel fari Esperanton utila al la esperantistoj". Je la 14a : Foriro de la Palaco de la Kongresoj al la "Côte Vermeille" tra Argelès, Collioure, Port-Vendres, Banyuls sur mer. Vizito de la Marlaboratorio "Arago". Je la 21a: Folklora Vespero en la Ĝardenoj de la fama ceramika ateliero "Sant Vicens".
M.9an de junio : Je la 7a : Foriro de la Palaco de la Kongresoj per specialaj aŭtobusoj al Barcelono kun vizito de la urbo kaj tagmanĝo en tipa restoracio "La Masia" sur la monto "Tibidabo" kun rigardo super Barcelono.

Organizantoj: Centre Culturel Espérantiste, 72 av. du Gén. de Gaulle, 66000 Perpignan, Tel. (68)34.22.18.
Eksterlandanoj : senpage. Kotizaliĝoj ĝis la 28/2/81: 100 FF. Geedzoj: 150 FF. Gejunuloj (inter 15 kaj 25j):65FF (inter 10 kaj 15j): 40 FF. Post la 28/2/81 : plus 10%.
Poŝtĉeke: 134358 M Montpellier.

********* PLEMET (22) - Bretonio ***********************

Esperanto-Klubo naskiĝis en la kolegio, kaj de la 20a de novembro, 9 geknaboj sekvas kurson, po 2 duonhoroj ĉiusemajne.
Kadre de la laika amikaro, ni organizis ekspozicion kaj prelegon (kiun faris Sylvestre Guillou). Trideko da plenkreskuloj kaj deko da infanoj ĉeestis. De la 8a de dec., 8 personoj sekvas ĉiusemajnan kurson.

Jacques PAUL



U R Ĝ A P E T O La gimnazio de PLEMET preparas gravan
*****************
laboron pri gazetaro. Ĉiuj klasoj partoprenas ĝin kaj, je la fino de la laboro, okazos ekspozicio. La juna E-Klubo deziras partopreni ĉi tiun laboron. Ni dopetas de ĉiuj eksterlandaj geesp-istoj, ke ili sendu al ni ekzempleron de ĉiutaga gazeto el sia lando (se eble la plej venditan) kun la traduko en Esperanto de la titoloj de la unua paĝo. Ni preferus ricevi gazetojn kiuj aperis, ĉu la unuan ĉu la duan de januaro 1981, sed ne gravas, se ne eblas. Ni kompreneble promesas sendi al ĉiuj sendintoj ekzempleron de ĉiutaga gazeto. Viaj sendaĵoj kuraĝigos komencantajn junajn geesperantistojn kaj estos bonega propagandilo en la lernejo kaj en la regiono. Ni antaŭdankas vin!

Zamenhof-Tago en EYSINES (Ĝirondio) la 21an de decembro.
**************************************************

En la tre agrabla "aera centro" kunvenis 37 personoj, espistoj kaj E-simpatiantoj, la plimulto el Ĝirondio kaj malmulte el aliaj departementoj, bedaŭrinde !
En simpatia etoso, ĉiuj, eĉ la infanoj, partoprenis en la organizado : kolektive ni preparis la manĝaĵon, faris servadon, purigadon, ordigon... Tamen ni trovis tempon por babiladi kaj kunveni : matene funkciis du grupoj. Izabela Martinez lerte, fervore kondukis dum pli ol unu horo E-kurson por la komencantoj kaj la neesperantistoj.
Samtempe, en konversacia grupo, post rapida recenzo de lokaj grupvivoj, Rolando Levreaud respondis al niaj demandoj pri Internacia Urĝa Agado. Estis ege interese, aŭdi lin pri liaj intervenoj en Alĝerio kaj Italio, kaj ricevi informojn pri la vera utileco de civilaj protektadoj oficialaj.
Amikece kaj plezure ni gustumis abundan, bongustan manĝon.
Poste, denove ni grupiĝis kaj interŝanĝis impresojn, memoraĵojn pri esperantaj spertoj en la franca lingvo por la komencantoj kaj la neesperantistoj, laŭcela diskutado !
Ankaŭ eblis al ĉiuj viziti la libroservon kaj rigardi la ekspozicion.
Eblas, ke venontan jaron, la Zamenhofa Tago okazos en Montauban.

Nikola, Claudette, Ginette.

# E-VIVO

Nederlanda Esperanto-Kongreso
******************************
24a/26a de aprilo 1981,
Oud-Leusen, komunumo Dalfsen.

De la 24a ĝis la 26a de aprilo 1981, okazos la Nederlanda E-Kongreso en la moderna konferencejo "De Bron", kiu troviĝas en la komunumo Dalfsen, en la orienta parto de Nederlando. La regiono estas riĉa je naturo kaj la konferencejo situas apud la rivero Vecht. Ekzistas eĉ ebleco kampadi apud la kongresejo. La kongresejo estas bone atingebla per aŭtomobilo kaj ankaŭ trajne/aŭtobuse. Por tiuj, kiuj alvenos vendrede (inter la 16a kaj la 18a) estos organizita veturado el la stacidomo de Dalfsen al la kongresejo.
Centra temo de la kongreso estos "Energio", lige al la en Nederlando okazonta t.n. larĝskala socia diskutado pri energioprovizado. Pri tiu temo prelegos prof. Dr. Otto Haszpra, hungara scienculo kaj la franca medio-aktivulo Roland Levreaud. O. Haszpra prelegos ankaŭ pri la aplikado de Esp-o en la sciencoj.
Estas la intenco eldoni specialan kongresan dosieron pri la energio-problemaro. Dimanĉe posttagmeze okazos kulmine forumdiskutado kun partopreno de diversaj nederlandaj politikistoj en antaŭbalota periodo.
Dum la kongreso okazos sabate la jarkunvenoj de kelkaj el la nederlandaj E-organizaĵoj, kiuj ĉiuj kune organizis la kongreson, la unuan komunan kongreson. La teatra grupo TESPA el Parizo prezentos sabatvespere teatraĵon de la moderna franca aŭtoro Boyer.
La kostoj de la kongreso, inkl. ĉion, estas 137,50 gld., se oni aliĝas antaŭ la komenco de la jaro 1981a. Por gejunuloj estas malpli kosta tarifo, nome 100 gld, se oni pretas dormi en granda salono. Aliĝilojn oni povas peti ĉe la kasisto de la Nederlanda E-Kongreso, Hoeveweg 18, NL 8394 VR De Hoeve, Nederlando. Ĉe li oni samtempe povas mendi kongresglumarkojn (0,75 gld por folio de 10 markoj), kiu montras la emblemon de la komunumo Dalfsen kaj modernstile mencias pri la kongreso.
NEPRE ni kore bonvenigos eksterlandajn partoprenantojn, do NE HEZITU !
Por pliaj informoj : sekr-ino Nederlanda Esperanto-Kongreso S-rino I. Boode, Polderlaan 46a, NL - 3074 ME Rotterdam.